

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: S-ro M. COLLEU 95, rue Victor Hugo 80440 BOVES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N^o 185 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1995 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

L' année 1995 a été déclarée celle de la tolérance. Cela paraît aller de soi, tellement nous sommes convaincus d' être naturellement tolérants. Et pourtant l' Autre, au premier abord, nous fait toujours un peu peur. Inconsciemment, nous souhaiterions que l' Autre nous ressemble, qu' il soit un autre nous-même. Or nous constatons vite qu' il est différent. Il n' a pas nos idées, il pense différemment; ses goûts ne sont pas les nôtres, ses choix, ses réactions nous déconcertent et si, en outre, sa langue ou sa religion sont dissemblables, alors c' est sûr, c' est un étranger, c' est-à-dire un homme dont le comportement nous heurte et qu' il y a lieu de rejeter ou tout au moins de tenir à l' écart. Et l' on finit alors plus ou moins à prendre en grippe celui que l' on écarte.

Cette attitude, innée chez nous, ne saurait être celle du chrétien, espérantiste de surcroît. Car, si nous repoussons l' Autre, d' un autre côté, nous sommes attirés vers lui. En effet, quand nous l' observons de plus près, nous constatons vite que derrière un mode de vie et de pensée différent du nôtre se cache un être humain en tout point semblable à nous et qui parfois nous est même supérieur.

Nous qui sommes espérantistes et avons, grâce à la Langue Internationale, de nombreux contacts avec des étrangers dont la culture, la sensibilité, parfois la religion ne sont pas les nôtres, nous voyons vite quelle richesse se cache derrière cette différence et nous apprenons alors à discerner les qualités de nos correspondants et amis.

C' est alors que la tolérance habite en nos coeurs, car être tolérant, c' est d' abord comprendre, apprécier et respecter autrui en cessant d' être égocentriste, donc intolérant.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

La jaro 1995 estas tiu de la toleremo. Tio povas aspekti memevidenta, ĉar ni tiel konvinkigas pri nia natura toleremo. Kaj tamen la Alia, unuavide, ĉiam iom timigs nin. Senkonscie ni ŝatus, ke la Alia simulu nin, ke li estu alia nio. Sed ni baldaŭ konstatas, ke li estas alia. Li ne havas niajn ideojn, li alimaniere pensas; liaj emoj ne estas la niaj, liaj elektoj, liaj reagoj konfuzas nin, kaj se krome lia lingvo aŭ lia religio malsimilas, tiam, certe, li estas fremdulo, t.e. viro, kies sinteno ŝokas nin, kaj kiun necesas forpuŝi aŭ minimume fortenti. Kaj oni fine pli malpli ekmalŝatas tiun, kiun oni forigas.

Tiu sinteno, ĉe ni denaska, ne povas esti tiu de la kristano, krome esperantisto. Ĉar, se ni forpuŝas la Alian, aliflanke ni sentas altiron al li. Efektive, kiam ni pli proksime lin observas, ni rapide konstatas, ke malantaŭ vivkaj pensmaniero malsimila je la nia, sin kaŝas homo ĉiel simila al ni, foje eĉ supera al ni.

Ni, esperantistoj, kiuj, dank' al la Internacia Lingvo, havas multajn kontaktojn kun alilandanoj, kies kulturo, sentemo, foje religio ne estas la niaj, baldaŭ vidas, kian riĉecon kaŝas tiu diferenco, kaj ni sekve lernas malkovri la kvalitojn de niaj korespondantoj kaj amikoj.

Tiam toleremo loĝas en niaj koroj, ĉar esti tolerema signifas kompreni, ŝati kaj respekti la aliulojn, ne plu estante egoistoj, do netoleremaj.

A. B.

+++++

INTERNACIECO

- Via Kristo estas juda
 - Via aŭtomobilo estas japana
 - Via paĉco estas itala kaj via kuskuso alĝeria
- Via demokrateco estas greka
 - Via kafo estas brazila
 - Via horloĝo estas svisa
- Via ĉemizo estas hinda
 - Via radioaparato korea
 - Via libertempo turka, tunizia aŭ maroka
- Viaj ciferoj estas arabaj
 - Via skribaĵo estas latina
 - Kaj... vi ripropcas vian najbaron,
 - Ĉar li estas eksterlandano!

+++++

REGULARO DE SANKTA BENEDIKTO (daŭrigo)

Ili estas tiuj, kiuj, timantaj la Sinjoron, ne fieregas pro sia fidela obeo, sed agnoskas, ke la bono, kiu troviĝas en ili, ~~kaj kiam xkx kxxxx~~ devenas ne de ili, sed de la Sinjoro, kiu agas en ili, kaj kiun ili gloras. Kun la profeto ili diras: "Ne al ni, ho Eternulo, ne al ni, sed al Via nomo donu honoron". (Ps. 113, 1). La apostolo Paŭlo same ne atribuis al si ion pri sia predikado, dirante: "Per la graco de Dio mi estas tio, kio mi estas". (Kor. 15, 10). Li ankaŭ diras: "Kiu fieras, tiu fieru en la Eternulo". Ĉar ankaŭ la Sinjoro diras en la Evangelio: "Ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn vortojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko; falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj ili albatis tiun domon, kaj ĝi ne falis, ĉar ĝi estis fondita sur roko". (Mat. 7, 24-25). Fine, la Sinjoro ĉiutage atendas, ke ni respondos per niaj agoj al Liaj sanktaj admonoj. Por la korektado de niaj pekoj estas multigitaj la tagoj de ĉi tiu vivo kvazaŭ paŭzo, tial la apostolo diras: "Ĉu vi ne scias, ke la pacienco de Dio alkondukos vin al pento?" (Rom. 2, 4). Ĉar la tenera Sinjoro diras: "Mi ne deziras la morton de la pekanto, sed ke li konvertiĝu kaj vivu".

Miaj fratoj, tuj kiam ni demandis la Sinjoron, kion ni devas fari por loĝi en Lian tabernaklon, ni aŭdis Lian ordonon: se ni plenumos nian devon, ni estos la herodantoj de la Ĉiela regno. (daŭrigota)

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo)

En novembro 1890, duonjarcenton post sia apero, "La vivo de la Virgulino Maria..." de Brentano trafis la manojn de la Filinoj de la Karitato de Smyrne (Izmir), kies komunumo prizorgis la francan malsanulejon. Oni legas tiun libron en la manĝejo. La superulino, Fratino Maria de Mandat Grancey (1), eksterordinara personeco, ekskuiĝas aŭdante la legadon de la supra cititaj tekstoj. "Efezo ne estas tiel malproksima. Valorus la penon ĝin viziti", ŝi tuj diras al la animzorganto, Sinjoro Jung, Lazaristo.

Despli vigla estis la scivolo de la monaĥino, ke ŝi ekmemoris pri freŝdata okazaĵo. Unu el ŝiaj malsanulinoj, kuracata en la malsanulejo, muzulmana druzino, ofte ripetis al ŝi: "Mi paŝtas miajn kaprinojn sur monto, apud Aya Sou-louk (Efezo). Tia staras ruinaĵo meze de arbaro. Plurfoje mi vidis tia virinon kun nigra vualo, kiu diradis al mi: "Mi estas Myriam (Maria)". Tedito de tiu "sen-senca babilado", Fratino Maria neniel atentis pri ĝi. (2)

Sinjoro Jung ne partoprenis la entuziasmon de la monaĥino. La revelacioj lasis lin indiferenta se ne skeptika. Fari ekspedicion en la montarajn makisojn, kiuj ĉirkaŭis Efezon ne tre allogis lin.

Tamen, Sinjoro Poulin, superulo de la Lazaristoj kaj estro de la grava kolegio de la Sankta Koro en Smyrne, eminenta specialisto pri la hebrea lingvo, tre bone informita pri la revelacioj, kiujn oni jam preparolis kun intereso en la katolika komunumo, volis havi pli da detaloj pri ili. Necesis kontroli ilian verecon surloke.

Fratino Maria volontulis. Ĉevalrajdie ne embarasis ŝin. Ŝiaj botoj estis pretaj. Sinjoro Poulin aldonis subkavaliron al tiu amazono, animo de la ekspedicio. Estis Sinjoro Jung, La Lazaristo, kvankam sen iluzioj pri la rezulto de la ekspedicio, cedis pro obeemo kaj pro la influo, kiun havis Fratino Maria.

(daŭrigota)

1. Fratino Maria, naskiĝinta en 1837 en la kastelo de Grancey (Côte-d'Or), mortis en Smyrne en 1915. Ŝi estis parenicino de Mandat de Grancey, kiu komandis unu el la taĉmentoj gardantaj Ludovikon la XVI-an, la 10-an de aŭgusto 1792, kaj estis murdita la saman tagon.
2. La historiaj fontoj koncernantaj la malkovron de la "Domo de la Virgulino" venas, unuflanke, el la arkivoj de la Filinoj de la Karitato (140, rue du Bac en Paris), aliflanke, el la familiaj memoraĵoj de la Grafo Jean de Boigne (naskiĝinta en 1901), kiu konis sian praonklinon (kaj konfirmacian baptopatrinon), Fratino Maria de Mandat Grancey. Ekzistas fotoj pri Fratino Maria rajdanta, kun botoj, en la tiama regula kostumo de la Filinoj de la Karitato, kaj tiel veturanta al Panagia Kapulu. Al la fratino arkivistino kaj al la Grafo de Boigne, ni esprimas nian dankon.

PERSONA ALVOKO

"Mi estas reedziĝinta divorcinto kaj deziras kontakti aliajn por interŝanĝi informojn pri nia situacio en la Eklezio, pri la problemo de la Sankta Komunio ktp. Dankon pro via helpo".

Yves PETIT
7, rue Gabriel Péri
59494 PETITE-FORÊT

IKUE-membroj 1995

1. S-ro AMOUROUX; 2. S-ro SAUTREUIL; 3. S-ro THIOILLIERE; 4. D-ro VEDRINE; 5. S-ro BINCHE; 6. S-ro BERNARD; 7. S-ro MILLET; 8. G-roj LANDRIN; 9. G-roj SANSON; 10. S-ro PONS; 11. S-ro COLLEU; 12. S-ino CHEVERRY; 13. S-ro BLIN; 14. P-ro SCHNEIDER; 15. F-ino GOUDE; 16. S-ro GOURDON; 17. S-ro COLAS; 18. S-ro PETIT; 19. S-ro ZILLIOX; 20. S-ino GILLES; 21. G-roj LEVAL; 22. S-ro ROYER; 23. S-ro DOYELLE;

FONTO DE ETERNA JUNECO

Ekde miloj da jaroj tibetaj lamaoj praktikas kvin ritojn. Tiuj ritoj estas simplaj ekzercoj, sed ilia regula ĉiutaga praktikado estas ĉiosilo por eterna juneco, sano kaj vitala energio. Ĉiu aparta ekzerco estas efika.

Rito unua

Staru rekte etendante la brakojn paralele kun planko manplatojn malsupren Turniĝu ĉirkaŭ la akso. Gravas, ke vi turniĝu de maldekstra dekstren (iaŭ la movo de horloĝmontriloj).

Rito dua

Kuŝiĝu surdorse, brakojn laŭlonge de la korpo, manplatojn al planko. Levu la kapon, tiru la mentonon al torako. Samtempe levu rektigitajn gambojn ĝis la vertikalo. Poste mallevu malrapide kapon kaj gambojn. Malsiretu la muskolojn. Profunde enspiru dum levo de kapo kaj gamboj, profunda elspiro dum la mallevo.
(daŭrigota)

KOTIZTABELO 1995

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F
Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 521 81 P.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F
geseda paro 50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F
bonferanto 200 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "L'Actualités" 280 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l'Esperanto s.a.p. ROUEN 2 324 93 N.

ENHAVO

- | | |
|--------------------------------------------|---------------------------|
| 1. La mot du président | Amiko enĝusta |
| 2. La bileto de la prezidanto Internacieco | 4. La kristana oriento |
| Regularo de S-ta Benedikto | 5? Kio estas la piko? |
| 3. Preĝo al la S-ta Spirito | Kasistino helpokamio |
| | 6. Fonto de eterna juneco |

Kotiztabelo

Dépôt légal: 2ème trimestre 1995 !! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6
11 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous
D.P.P.A.P. n° 62 532. 11 la n° 2 523 bis, J.O. 25/05/1977)
Directeur: Albert BESSIERE 11 au Prieuré St-Martin
Directeur-délégué: 11 77610 LA MOUCAYE EN BRIE

René-Jean NARHOU

1. FRANCE

* * * * *
* * * * *